

ESPERANTO PROVENCE

Numero 95 - Vintro 2013 / 2014

www.esperanto-provence.org

4 numeroj / Jare

www.facebook.com/esperantoprovence

redaktoro:

Pascal Vilain

p.vilain83@orange.fr

61 montée du Castelar

83460 TARADEAU

kasisto:

Michel Cerisay

mcerisay@gmail.com

15 Place des Vents Provençaux

13140 MIRAMAS

Vorto de la Prezidanto

Feliĉan Novan Jaron al vi kaj viaj familioj, sen forgesi multajn sukcesojn en via Esperanta agado !

En la ĵus pasinta jaro, la Mediteranea Esperanto -Semajno en *Les Issambres* kaj la staĝo en *Le Beausset* okazis kun kontentiga partopreno. Laŭ mia scio, la kursoj sufiĉe bone disvolviĝis en la diversaj federaciaj kluboj. Kiel plezure estas tion konstati !

Tamen estis « tubero en la afero » : ni ne sukce-

sis partopreni en la programo « Marsejlo - Eŭropa Kultura Ĉefurbo 2013 » ĉar ni ne povis proponi grandiozan kaj koston projekton.

Mi deziras, ke dum 2014 ni plu kaj pli distrumpetu pri Esperanto kaj ke ĉie, sed unue ĉirkaŭ ni, ni sukcesu komprenigi la neceson de nia lingvo por la mondo !

Pierre Oliva

Atentu / Attention

Ne forgesu pagi la aliĝkotizon – 6€ - al Esperanto-PACA por la jaro 2014, ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Michel Cerisay (aliĝilo aldonita al tiu ĉi bulteno).

Dankon !

N'oubliez pas de payer la cotisation de 6 € à Espéranto PACA pour l'année 2014, soit par l'intermédiaire de votre groupe local, soit directement à notre trésorier, Michel Cerisay (formulaire d'adhésion joint à ce bulletin).

Merci !

Nia membro-kunveno okazos la 6an de Aprilo, je la 10a en Aix-en-Provence

Maison des Amis de la Nature - pont de Béraud, rue Vauvenargues

... okaze de dutaga staĝo, la 5^{an} kaj 6^{an} de Aprilo
deklita komuna dormejo (10 €)
aŭ proksimaj junulargastejo kaj hoteloj
manĝoj en apuda restoracio
kunvokilo kaj rajtigilo
estas aldonitaj al tiu ĉi bulteno

por pliaj informoj :

Bernard Greck 04 86 90 24 97

bonvolu sciigi vian partoprenon al :

monique.arnaud@aliceadsl.fr

tel : 04 92 50 03 07

... à l'occasion d'un stage de deux jours,
les 5 et 6 avril
dortoir de 10 lits (10 €)
ou auberge de jeunesse et hôtels proches
repas dans un restaurant à proximité
convocation et pouvoir joints à ce bulletin

pour plus d'informations :

Bernard Greck 04 86 90 24 97

veuillez annoncer votre participation à :

monique.arnaud@aliceadsl.fr

tel : 04 92 50 03 07

Agrabla novaĵo

Kadre de sia Panteono, la fondaĵo « edukado.net » premie publikigas 10-15 novajn prezentajn de vivantaj instruistoj, ĉiujare la 15an de Decembro.

Fine de 2013, ĝi plian fojon elektis dekdu plej elstarajn instruistojn : inter la 12, elektigis po unu el Ĉinio, Usono, Japanio, Irano, Pollando, Hungario, Rumanio, Belgio, Islando, Danlando. Nur

Francio pintas kun du honorigitaj : Renée Triolle, nia bone konata samfederaciano, kaj alia Provencano, Michel Duc-Goninaz.

Ĉiuj anoj de la federacio « Espéranto-Provence » tutkore gratulas ilin !

Asociaj raportoj por la jaro 2013

1. Morala

Finiĝis la jaro 2013 kaj mi devas skribi ĉi tiun raporton multe da tempo antaŭ nia ĝenerala membro-kunveno. Ne estas agrabla afero ĉar ĉiuj jaroj similas.

Nia PACA-grupo vivas kaj estas vigla. Mi konstatis, ke la diversaj esperanto-kursoj havis kelkajn novajn gelernantojn ; la staĝoj estis plenplenaj kaj ok kandidatoj partoprenis en la KER-ekzameno en Avinjono. Ĉio tio estas tre pozitiva. Des pli ke ĉi tiun

jaron, la komencantoj ŝajne pli multnombre partoprenis en niaj renkontiĝoj, kursoj kaj staĝoj. Ni devus profiti la okazon de la nuna ĝenerala membro-kunveno por diskuti pri maniero interesi ankoraŭ pli efike la novajn geesperantistojn.

Skribante ĉi tiun raporton, mi havas la esperon, ke ni partoprenos same multnombraj, kiel dum la pasintjara membrokunveno.

2. Agada

Membraro :

La Esperanto-Provence Federacio havis 68 membrojn je la 18/12/2013.

13 grupoj en la jenaj departementoj kaj urboj :

04 : Manosque kaj Villeneuve ; 05 : Gap ; 06 : Nice, Cannes ; 13 : La Ciotat, La Roque d'Anthéron - Miramas, Marseille ; 83 : Fréjus-St Raphaël, Toulon, Le Beausset ; 84 : Avignon, Carpentras, Orange.

Administro :

Membrokunveno okazis en les Issambres la 10^{an} de Marto 2013 komence de la M.E.S.-renkontiĝo.

Elektio de Komitatanoj :

Arnaud Monique ; Cerisay Michel ; Demongeot Claudie ; Mimmersheim Franz ; Oliva Pierre ; Spanjaart Thierry ; Triolle Renée ; Pascal Vilain ; Wallez Gilles

Prezidanto : Pierre Oliva

vic-prezidanto : neniu

sekretario : Monique Arnaud

help-sekretario : Claudie Demongeot

kasisto : Michel Cerisay

respondeculoj pri bulteno : Pascal Vilain / Bernadette Deschanel

rilatoj kun Espéranto-France : Monique Arnaud / Gilles Wallez

Informado, Komunikado :

La federacio plu eldonas sian trimonatan bultenon : « *Espéranto-Provence* ».

Unu klubo eldonas propran bultenon.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj :

- Tago de la Patrino Lingvo : laŭ iniciato de UNESKO, la 21^a de Februaro estas dediĉita al la patrinaj lingvoj, la lingvo en kiu ĉiu homo strukturigas sian penson kaj malkovras la mondon.

- Pro ferioj de nia regiono, Monique Arnaud vizitis 2 mezgradajn lernejojn apud Grenoble.

- Virina Tago la 8^{an} de Marto : kiel kutime en La Ciotat, budo pri du elstaraj verkistinoj (rusa kaj nederlanda), informado kaj partopreno en la diskutoj.

- Kiel anoncote en la vintra numero de nia bulteno, okazis Esperanta semajno en la Manoska turismo-ficejo, de la 18^a ĝis la 23^a de Marto.

- Ĵaŭdon la 23^{an} de Majo 2013, EKEM-04-Esperanto prezentis Esperanton al lernantoj de la Internacia Lernejo de Manosko, kaj ankaŭ en la lernejo « *Lycée Esclangon* » en Manosko la 20^{an} de Septembro okaze de la Festo de la Paco.

- En Gap okaze de la Festo de la Paco dimanĉon la 23^{an} de Junio en la Parko de *Charance*.

- En Ste Tulle la 29^{an} de Junio okaze de la Festo de la Solidareco.

- En Embrun la 7^{an} kaj 8^{an} de Septembro okaze de Foiro *Génépi*.

- Forumo de Asocioj : pluraj kluboj starigis budon en diversaj lokoj : Espéranto-Marseille dimanĉon la 8^{an} de Septembro de la 10a ĝis la 17a en Parko *Borely* ; sabaton la 14^{an} de Septembro en Le Beausset (83) ; la 14^{an} kaj 15^{an} de Septembro en Fréjus.

- « *Fête des Places* » en La Ciotat (13) la 12^{an} de Oktobro, kaj dum la jaro aperas regula informo pri la klubo en la gazeto de CIQ, Maison des Associations.

- En Tulono, F. Noireau regule ĝisdatigas perretajn anoncetojn pri kursoj de la lingvo Esperanto.

- En CEA – Cadarache, ekspozicio estis videbla dum unu semajno fine de Novembro kaj artikolo pri Esperanto aperis en la entreprena bulteno.

Instruado kaj ekzamenoj :

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj iniciatajn staĝojn en klubejoj, lernejoj.

La 8^{an} de Junio en Avinjono, 8 kluboj trapasis la KER-ekzamenojn : 5 sukcesis la B2 kaj 3 la B1 (skriba parto por ĉiuj). En Grésillon, 1 sukcesis la komplek-

san B2. Gratulojn al ili !

Kursoj, instruado :

- En Marseille, regula semajna kurso (konversacio) en *CIRA* kaj en La Domo de Asocioj.
- En La Ciotat, regula semajna kurso en *CIQ-Fontsainte*, je dua nivelo ĉar mankas novuloj.
- La planita intensiva staĝo en La Ciotat la 5^{an} kaj 6^{an} de Oktobro ne okazis pro manko de kandidatoj.
- Semajnfina staĝo la 30^{an} de Novembro kaj 1^{an} de Decembro 2013 en Le Beausset kun 28 partoprenintoj, 3 kursniveloj.
- Kursoj en Manosko la 1^{an} kaj 3an merkredon de la monato.
- Sabaton 17^{an} de Marto, tuttaga staĝo en la Domo de la Asocioj en Manosko.
- Dum la jaro 2013 ne okazis kurso en Gap.
- En St Raphaël, 7 homoj vizitis la kurson, kiu okazas lunde posttagmeze.
- La klubo Fréjus – St-Raphaël organizis M.E.S, unusemajnan staĝon ĉe la marborbo en Les Issambres, en Marto. Partoprenis multaj eksterlandanoj.
- Kursoj por komencantoj en Le Beausset.

Kulturo kaj aranĝoj, kultura agado kaj prelegvojaĝoj :

- Festo de la Tri Reĝoj okazis en diversaj lokoj : 83 - Esperanto-Klubo de Fréjus – St-Raphaël, samtempe kun ĝenerala membro-kunveno ; 83 - Le Beausset la 9^{an} de Januaro ; 13 - Espéranto - La Ciotat
- Nova klubo estis kreita en le Beausset - 13^{an} de Januaro 2013 kaj la respondeculoj proponis ekspozicion de la 1a ĝis la 9a de Februaro. La inaŭguro de ĉi tiu evento kunigis dudekon da personoj vendredon 1an de Februaro, en la ĉeesto de reprezentantino de la urbestro. La 6^{an} de Februaro, en la kultura centro « *Pôle Saint-Exupéry* », okaze de la ekspozicio, Alain Rémy raportis pri sia antaŭlasta vojaĝo al Ĉinio, Usono...
- jOmO kantis en La Ciotat, invitita de Espéranto-la Ciotat, mardon la 26^{an} de Februaro je la 20.30 en la *Théâtre du Golfe*. Estis granda sukceso, tre bona etoso !
- Vizitintoj en *Le Beausset*, fine de Julio : Nicole kaj Pierre Oliva gastigis Jozefo-n kaj Maria-n *Trnka* el

Hungario.

- Vizito de Milada kaj Petro Chrlde, kiu kunportis dekojn da libroj « *Comme un vol d'oiseaux sacrés* ». Niaj eksterlandaj geamikoj alvenis en *Le Beausset* la 15^{an} de Junio.
- En Les Issambres (Val D'Esquières, la MES-ejo) fine de Junio okazis komuna manĝo kun la klubo « Fréjus - St-Raphaël » por festi la finon de la lerno-jaro.

- Prelegturneo de Franciska Toubale kiu vizitis nian federacion dum unu semajno.

Unue estis akcepto kaj publika prelego pri « Aborigenoj kaj migrintoj en Aŭstralio : sama batalo » ; 2 artikoloj kun foto en la lokaj gazetoj en Marsejlo kaj La Ciotat.

22^a de Septembro en Aix-en-Provence (13)

23^a : Marseille (13)

26^a : Manosque (04)

27^a : Gap-Saint-Bonnet (05)

Okaze de la Tago de la Eŭropaj lingvoj, okazis vizitoj al mezgradaj lernejoj en Ste-Tulle (04) kaj en St-Bonnet (05). Franciska prezentis la etnan radion de Melburno « 3ZZZ », kiu elsendas programon en 68 lingvoj ; inter ili : Esperanto ! Aperis artikolo en la Gazeto « *Le Dauphiné Libéré* ».

- Multaj federacianoj partoprenis en Esperantaj kongresoj aŭ renkontiĝoj (francaj kaj eksterlandaj) kaj staĝoj :

ses Provencanoj partoprenis en la nacia kongreso en Artigues apud Bordojo.

kvar en la U.K.-o en Islando.

unu en la itala kongreso en Kastelaro (kaj aperigis prian artikolon en la loka gazeto « *Le Dauphiné Libéré* »)

- Zamenhof-Tago en St-Raphaël kun trideko da partoprenantoj ; bonega artikolo en la loka gazeto.

- Zamenhof-tago ankaŭ en Avinjono

Biblioteko : daŭra disponigo al la klubanoj de libroj kaj gazetoj en Esperanto.

Venontaj projektoj ; eksteraj rilatoj :

- Mediteranea Esperanto-Semajno, en les Issambres (83), de la 8^a ĝis la 15^a de Marto

- Membrokunveno en Aix-en-Provence, la 6an de Aprilo, en la Domo de la Naturamikoj

- Nacia Kongreso, en Chambéry, la 31^{an} de Majo/ 1^{an} de Junio 2014

raportis Monique Arnaud

Limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta numero :

31a de Marto 2014

Bonvolu sendi al : p.vilain83@orange.fr

Antaŭdankojn pro viaj kontribuoj

Espéranto Provence 3

3 - Financa
Compte de résultat
Exercice 2013

Libellé	Cpt	Débit	Crédit
Achat de petit matériel	6 060	19,70	
Tirage de la gazette	6 230	216,25	
Frais de déplacement	6 240	61,00	
Frais postaux (gazette)	6 260	188,00	
Aide à la création de club	6 578	81,12	
Collecte congrès africain reversée à E° France	6 730	241,00	
Frais du spectacle jOmO	6 700	321,12	
Stage Le Beausset	6 720	1125,24	
Soirées & sorties diverses	7 080		342,00
Adhésions (12 à 5 €, ancien taux)	7 500		60,00
Adhésions (47 à 6 €, nouveau taux)	7 500		282,00
Espéranto-France reversement	7 501		88,80
Collecte pour le congrès africain	7 730		241,00
Féd Eo-Rhône-Alpes	7 780		220,00
Intérêts livret bleu	7 610		68,25
Stage Le Beausset	7 720		1487,00
Dons	7 760		70,00
TOTAL		2253,43	2859,05

Soldes au 31 décembre 2013

Résultat de l'exercice 2013 : positif de	605,62
Caisse	10,98
Banque	3,8
Compte sur livret	5167,44
TOTAL	5182,22

le trésorier, Michel Cerisay

Malĝajiga novaĵo...

Roland Delagneau, emerita instruisto el Saint-Jeannet (06), mortis post kelkmonata malsano sekvanta cerboatakon.

Kun la edzino, ili estas inter la homoj, kiuj L'autre jour« faris » Grezizonon, fosis la naĝejon kaj laboris tie somere. Ambaŭ anticipis la nunan modon pri sana vivmaniero, biciklis al ILEI-konferencoj. Roland Delagneau vendis legomajn semojn el malnovaj legomoj, kaj kreskigis stevion, kiam neniu sciis, ke tiu planto ekzistas, ne parolante pri fruktoarboj.

Tre sperta en la lingvo, li estis nia « enciklopedio » eĉ se li tre modeste kaŝis siajn talentojn. Li havis la feliĉon festi kun la edzino 70



*Aprilo 2013 :
Festo de la 70a geedzeca datreveno*

jarojn da geedzeco.

Ni kondolencas al la edzino kaj gefiloj.
Ne plu povante vivi en Saint-Jeanet, Madeleine
havas novan adreson :

22 place de la République
77300 Fontainebleau
kaj estas telefone kontaktebla je la
n° 09 54 38 29 07.

El niaj federaciaj asocioj

04 - Esperanta Kulturo en Manosque

- 20 septembre : journée de la paix



*courte présentation de l'espéranto au
Lycée Esclangon de Manosque,
sur invitation de la Conseillère Principale d'Orientation
(à gauche)*

- Samedi 16 novembre : stage de 9h30 à 17h.
- Du 25 au 29 novembre : présentation de l'espéranto dans les locaux de la cafétéria de la restauration n°1 du Centre d'Etudes Nucléaire de Cadarache.



à Cadarache

- Dimanche 15 décembre : participation du groupe à la Fête de Zamenhof à Avignon.

Texte envoyé au mouvement scout de Manosque :

« Le Général Robert Baden-Powell , le père du scoutisme mondial avait recommandé l'usage de l'espéranto, la langue internationale équitable.

Actuellement, « Skolta Esperanto-Ligo » (le mouvement "espéranto" des scouts) peut être joint chez sel@scoutnet.org et pour info chez

<ttt.esperanto.org/skolta>. Voir aussi <toujours prêt - sat-amikaro>. A Manosque, EKEM-04-Esperanto a repris ses cours et permanences le 1^{er} et le 3^{ème} mercredi de chaque mois à la Maison des Associations de Manosque de 17h et demi à 20 heures. Pour EKEM José 04 92 72 39 89. »

pri ĉio raportis José Grammatico

05 – Espéranto-Gap

Unesko

Du 5 au 20 novembre s'est tenue à Paris la 37^{ème} Conférence Générale de l'Unesco, en présence de plusieurs chefs d'Etats, de 200 ministres et de 3000 délégués. Comme il est de coutume, une délégation d'enseignants espérantistes admis comme observateurs, parmi lesquels Renée Triolle et Monique Arnaud, a pu assister aux travaux. Le Dauphiné Libéré a rendu compte de cet événement dans son édition du 28 novembre.



13 - Espéranto - La Ciotat kaj Marsejlo Forumo de Asocioj en La Ciotat kaj Marsejlo la 7an kaj 8an de Septembro

Tradicie, la Forumoj sekvas unu la aliajn, tiel ke la materialo restas en la veturilo kaj facile trans-

portigās de loko al loko. Sed la etoso estas vere mal-simila.

En La Ciotat, malgranda urbo kun 35.000 loĝantoj, Esperanto estas bone konata kaj ni ĉefe informis pri la venontaj kursoj aŭ intensiva staĝo kaj invitis al la prelego. Dankojn al Michel kaj Pierre, kiuj krome muntis la tendon, Loukie kaj Renée kiuj deĵoris. Ĉar la Forumo estis 20jara, aparta panelo traktis la diversajn tradukojn de /ven/ vint, vin, il vint, vain, vaincs kaj ebligis montri kiel funkcias la lingvo.



Multe da vizitintoj en La Ciotat

En Marsejlo, tute ne atendite, multaj homoj, kiuj jam sciis pri Esperanto, venis por peti kiel lerni. Ni vidos. Kaj daŭre konstatablas, ke maljunuloj scias, aŭ konas iun, kiu parolas aŭ parolis Esperanton dum junaj paroj malkovras eĉ la nomon. Sed multaj vere interesiĝis pri la ideo, kaj malkovris novan aliron al internacia komunikado. Ni ankaŭ sisteme kontaktis la infanojn, petante, ĉu ili scias kiom da lingvoj estas en la mondo. La 6jaruloj respondas "multaj" kaj proponas 20 ! Sed estas bona aliro al prezento al la gepatroj. Same ni akcentas, ĉe diverskoloraj vizitantoj, la malegalecon de lingvotraktado kaj la bezonon prizorgi ĉiujn lingvojn kaj kulturojn. Dankojn al Thierry, Astrid, Flavie, Pierre kaj Renée.

raportis Renée Triolle



Tre vivanta forumo en Marsejlo

Festo de la Placoj en La Ciotat la 12an de Oktobro

Por viviĝi la diversajn placojn de la malnova urbo el la XVIIa jarcento, estas organizita Festo. Iuj asocioj zorgas pri unu placo kaj invitas aliajn asociojn partopreni. Esperanto-La Ciotat promenis tra la stratoj kun le Grand Portique : Alain Rémy kaj Renée Triolle faris bruon kaj muzikon, afiŝis libere literojn el ESPERANTO, kaj fine kun AD'ELLES havis buĉon. Eĉ se plufoje oni aŭdis ĉe mikrofono la vorton, malmultaj preterpasantoj estis, do malmultaj eblecoj informi homojn. Deĵoris Monique Arnaud, Alain Rémy kaj Renée Triolle.



Festo de la Placoj en La Ciotat

83 - Esperanto-Klubo-Fréjus-Saint-Raphaël

Forumo de Asocioj, dimanĉon la 15an de Septembro en Fréjus

La grupo de Fréjus - Saint-Raphaël, sub la gvido de Monique Prezioso kaj Christine Graissaguel, multnombre ĉeestis (kelk momente estis eĉ dek du homoj) sed plej energie vizitis la aliajn budojn kaj sinturnis al vizitantoj Carmen kaj Renée. La forumo titoliĝas "Festo de la sportoj kaj asocioj" sekve, ĉefe sportaj asocioj sin prezentas kaj demonstracias. Al la vizitantoj, plenkreskaj kaj infanoj, estis farita la demando, ĉu ili scias, kio estas skribita sur ilia T-ĉemizo. Kaj... neniu konas la tradukon, nur malmultaj scias, ke temas pri angla lingvo ! Ankaŭ tie grandskale estis distribuitaj la kalendaroj de 2013 kaj 2014.

raportis Renée Triolle



multaj deĵorantoj ĉe la Eo-budo

Zamenhof-festo

La dimanĉon 15an de Decembro, kiel kutime, dudeko da samideanoj kuniĝis sub la stratŝildo « Rue Zamenhof », en Saint-Raphaël, por omaĝi al la iniciatinto de nia lingvo. Poste, grupo de tridek geamikoj ĝuis bongustajn pladojn en restoracio de Fréjus, antaŭ ol kune pasigi agrablan posttagmezon en Esperanta etoso.

Ils parlent la langue de l'espérance



Les espérantistes ont rendu hommage au créateur de la langue espérantiste, le docteur Ludovic Zamenhof né le 15 décembre 1859. Une rue porte son nom à Saint-Raphaël. (Photo I. L.)

Il s'agit une bonne vingtaine à adhérer au club d'espéranto de Trippa Saint-Raphaël et à vouloir parler la langue de l'espérance.

La « Zamenhof-staĝo », autrement dit le jour de la naissance de l'inventeur de la langue internationale espéranto, – le docteur Ludovic Zamenhof (né le 15 décembre 1859) –, a donné au groupe l'occasion de se retrouver, de lui rendre hommage. Et de partager aussi ces livres de Noël. Autour de la présidente Denise Lisek, les Espérantistes ont lu un message d'amitié dans la rue raphaëloise qui porte le nom du docteur, face à la mer puis se sont réunis autour d'un repas. Suivi de jeux et chants en espéranto.

Toutes les personnes intéressées par cette langue sont bienvenues au club.

lequel tient une permanence et rassemble ses ouailles tous les lundis de 15 à 17 heures à la Maison des associations de Fréjus.

Sur les tablettes du club

Stages, galerie des Rois autour de l'Assemblée générale en janvier, congrès régional à Aix-en-Provence en avril 2014, puis congrès universel d'espéranto à Lille en 2015 sont d'ores et déjà inscrits les tablettes des adhérents. Sans oublier la semaine espérantiste organisée par le club raphaëlois-jurien et la fédération, du 8 au 15 mars 2014, aux Isambères, qui rassemblera une centaine de participants de tous les pays. « L'espéranto a été lancé il y a 125 ans pour permettre une vraie communication entre les personnes de

langue maternelle différente. Indépendant de tout pouvoir politique ou économique, de tout intérêt particulier, l'espéranto est ouvert à toutes les cultures, il permet de communiquer sur un pied d'égalité, sans discrimination, ont dit aussi les Espérantistes. Précis, expressif mais sans déclarations compliquées et verbes étranges, l'espéranto est simple à apprendre et parlé par des millions de personnes dans le monde. Avec l'espéranto, chacun fait un peu vers l'autre et donne accès à un réseau de contacts dans plus de cent pays. »

JOSÉLYNE JORIS
joris@eicemat.fr

Informations après du tél. local : 04 91 81 01 44 ou au 04 91 95 45 58 sur le site internet : esperanto-lance.org

83 – Espéranto – Le Beausset

Forum de Asocioj

Sabaton la 14an de Septembro, Nicole kaj Pierre Oliva instalas la budon ; kune ankaŭ deĵoris Renée.

La gimnazejo ofertas bele ŝirmitan lokon, la urbo manĝon al la deĵorantoj. Kompare kun alitipaj forumoj, tiu okazas for de la urbo, apud la mezgranda lernejo, tiel, ke multas la vizitantoj matene, sed la vizitantoj estis venintaj kun preta ideo : "mi praktikos sporton, aŭ muzikon" kaj interesiĝis pri la elktita temo. Ni nin turnis ĉefe al infanoj kaj junuloj kaj grandskale distribuis la novajn kalendaretojn de JEFO.

Ĉu kelkaj novaj personoj partoprenos en nia kurso ?

raportis Renée Triolle



Junuloj vizitis nin en Le Beausset

Staĝo

La 30an de Novembro kaj 1an de Decembro okazis la nun tradicia renkontiĝo en la bela staĝejo urbocentra. Dudek kvin partoprenantoj elektis inter la kursoj de Monika Arnaud (komencantoj), Josée Lafosse (ludoj, kanzonoj, teatraĵoj... por progresantoj) kaj Renée Triolle (diverstema diskuto).

La vespera programo konsistis el omaĝo al la kormemora Roland Delagneau, sekto de fotografajoj pri la UK en Rejkjaviko kaj plaĉega kantspektaklo proponita de nia talenta amiko Franz Mimmersheim.

Ni ŝuldas al Nicole kaj Pierre Oliva (kiu plian fojon regalis nin per bongustegaj manĝaĵoj) la perfektan organizadon de tiu staĝo. Dankon al ili !



laborema grupo gvidata de Josée L.

Diversaĵoj

Ĉu vi konas la Francan Esperanto-Instituton ?

Ĝi estas lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio.

Ĝi instigas la kursgvidantojn puŝi siajn lernantojn al trapaso de ekzamenoj. Nur tiel la lernantoj kapablos taksii sian nivelon kaj havi emon al plia studado.

La FEI-ekzamenoj taksas diversajn kapablojn, pri kiuj la nun popularaj KER-ekzamenoj tute ne okupiĝas : movada kulturo, pedagogio, tradukado, interpretado, uzo de Esperanto en turismo, scienco kaj teknikoj. Do, ambaŭ ekzamen-sistemoj kompletigas sin reciproke.

La tarifo por la unuagrada ekzameno estas nur 10 eŭroj. Kio ne devus esti obstaklo, ĉu ne ?

Ekde nun la studentaj verkoj por la Atesto pri Supera Lernado estas :

- « La fotoalbumo » de Trevor Steele
- « Ĉu vi konas Blaise Cendrars ? » de Manuel de Seabra
- « KREDU min Sinjorino » de Cezaro Rossetti
- « Ne ekzistas verdaj steloj » de Liven Dek

Por pliaj informoj ne hezitu viziti nian TTT-ejon :
<franca-esperanto-instituto.net>

Ĉu vi aŭskultas tiun retradion ?

Mi estas Francino. Via retradio :

<http://esperantaretradio.blogspot.com.br/> estas ege bona ĉar la persono, kiu parolas, ne parolas tro rapide. Oni bone komprenas, kaj estas ankaŭ ege bone, ke oni povas legi la tekston se oni ne komprenas kelkajn vortojn. La temoj de la elsendoj estas malsamaj kaj interesaj. Mi deziras, ke vi transdonu

tiun mesaĝon al la tuta skipo de tiu retradio kun miaj grandegaj dankoj.

Amike, Nelly de Massas

Ĉu vi legas « Le Monde diplomatique » en esperanto ?

Le Monde Diplomatique estas franca soci-politika kaj ekonomia revuo, kun 47 eldonoj en 28 lingvoj <<http://www.monde-diplomatique.fr/int/>>. De dek unu jaroj ekzistas reta esperanto-eldono, senpage disponebla [tie-><http://eo.mondediplo.com/>]

demande de soutiens espérantiste pour le scrutin européen du 25 mai 2014

Le mouvement «Europe Démocratie Espéranto» recherche des candidates et candidats pour soutenir l'espéranto au niveau européen.

Contactez Pierre Dieumegard

<pierre.dieumegard@free.fr>, copie à Bert <bertox@free.fr>.

Venontaj rendevuoj

En nia federacio

Januaro 26

Reĝkuka Festo en Saint-Raphaël ĉe Monique kaj Pierrot Prezioso

Marto 8-15

Mediterranea Esperanta Semajno en Les Issambres

Aprilo 5-6

Staĝo kaj Federacia Membro-kunveno en Aix-en-Provence (vidu en la bulteno)

En Francio

Marto 8-15

21^{eme} stage de chant choral en espéranto au Village de Vacances de La Bastide à l'Hers (Pays des Pyrénées cathares) organisé par le C.E.E.A. (Cercle d'Etudes Espérantistes de l'Ariège)
Infos : Monik' Garrigues 09600 LIMBRASSAC –
tel : 04 68 605 417 ; tutpeko@aliceadsl.fr
<http://esperanto.ariège.free.fr/>

Aprilo 19-26

FRINGOJ (Festa Renkonto Internacia de GeknabOJ) por infanoj kaj grupoj de lernantoj, kunlabore kun Elisabeth Barbay en la Esperanto-kastelo Greziljono

Aprilo 26 / Majo 4

PRINTEMPaS en la Esperanto-kastelo Greziljono : intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Chazarein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1).

Retejo: gresillon.org/fr

Kontakto: kastelo@gresillon.org, 02 41 89 10 34 ou 09 51 64 10 34 (répondeur)

Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ

Majo 31 / Junio 1-2

Kongreso de « Espéranto-France » kaj de la Federacio « Rhône-Alpes » en Chambéry (73)

Somero... 2015

Lille : 100a Universala Kongreso de Esperanto

Ekster nia lando

Majo 17-24

66a IFEF-kongreso en San Benedetto del Tronto - Italio

informoj : vitorni@virgilio.it

Julio 26 / Aŭgusto 2

99a Universala Kongreso en Bonaero (Buenos Aires) - Argentino

informoj ĉe UEA : uea.org/kongresoj

(Espéranto France vous propose cette année un voyage de groupe du 16.07 au 03.08 avec un pré-congrès de 9 jours en pension complète - 18 jours et 16 nuits – possibilité d'un hôtel à 5 min à pied du lieu du Congrès sans augmentation de prix - si réservation rapide. Dans le même contrat huit repas sont offerts pendant la durée du congrès. Nous n'avons pas à ce jour le nombre minimum de participants pour concrétiser ce projet, merci de nous faire savoir très vite - places d'avion réservées jusqu'au 31 janvier - si ce projet vous intéresse.)

infos : Espéranto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris ; ou : <http://esperanto-france.org/>)

Aŭgusto 23-30

81a Itala Kongreso en Fai della Paganella, Trento – temo : "Espéranto kaj novaj teknologioj".

Informoj kaj aliĝilo sur la TTT-ejo :

kongreso.esperanto.it